

Aŭstraliaj Esperantistoj



Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 28/01/2021 Kvincentdekkvina eldono (unua eldono 20/09/2011)



Subtenu vian Novajleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Uzindaj ligoj [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#)

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au



Entute **803,000** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **292,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas **239,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **218,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

Nun studas **54,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020)

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde majo 2021)



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

EKSTRAĴOJ ĈE LECIONO 19 DE "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard).

N.ro 20 de "Por Komencantoj".

Zamenhof kreis tre praktikan sistemon de Korelativoj, 45 mallongaj vortoj de naŭ malsamaj signifoj de po kvin formoj rilataj unu al la alia. La kvin formoj havas centran literon "i" kun neniu prefikso aŭ kun prefikso "k" aŭ "t" aŭ "ĉ" aŭ "nen". Ekzistas naŭ grupetoj kun tiaj prefiksoj, kaj ili havas naŭ diversajn sufiksojn por naŭ diversaj signifoj. Tiuj signifoj estas: **1e.** Aĵo aŭ eco (io); **2e.** Individueco (iu); **3e.** Kvalito (ia); **4e.** Loko (ie); **5e.** Posedo (ies); **6e.** Maniero (iel); **7e.** Motivo kaj kaŭzo (ial); **8e.** Tempo (iam); kaj **9e.** Kvanto (iom). La signife kunigitaj estas "io, iu, iam, k.t.p., por nedifino; "kio, ktp. por demandoj kaj rilataj pronomoj; "tio, ktp." por difino; "nenio, ktp." por seneco; kaj "ĉio, ktp." por inkluzivo. Ĉiu el la 45 Korelativoj funkcias kiel vortradiko, sed malofte toleras pluformadon, pro manko de bezono. Nur la vorto "(la)tialo" bezoniĝas kaj uzatas, ĉar ĝi signifas kombinon de "kaŭzo" plus "motivo" kune.



Marcel Leereveld.



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Surhavu vizaĝmaskon.

Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.

<https://twitter.com/i/status/1245591199034929153>

Homoj protektas aliulojn per la surporto de masko



Nukleaj armiloj nun estas kontraŭleĝaj en pli ol 50 nacioj

[Atomwaffen sind jetzt illegal! Jetzt raus aus Deutschland! / Nukes out of Germany, Netherlands, Belgium, Italy, and Turkey \(actionnetwork.org\)](#) **Roger Springer**



Bastonoj kaj ŝtonoj povas rompi miajn ostojn, sed vortoj neniam vundos min.

Mi kantis tiun frazon antaŭ okdek jaroj. La frazo ankaŭ aperis en 1872 **Roger Springer**



Pro mia kredo en tiu frazo, mi neniam havis fizikan batalon dum mia 89 jara vivo
Mi havis kontraŭajn argumentojn pri kredoj sed ne pri kiu estas la plej forta.



Pri la libero sinesprimi

Paralele, aŭstralia Nobelpremiito Sir Mark Oliphant diris,

- Mia rajto svingi mian brakon haltas ĉe la nazo de mia najbaro.

Margaret Furness, SA



Propagando

Propagandistoj uzas ĵurnalojn, radiojn, televidojn, la reton, filmojn, redirojn, fantaziojn, revojn, mensogojn, daŭrajn redirojn de celaj frazoj, preterlasojn de ne celaj frazoj, ktp

La plej danĝera propagando estas sekreteco de alternativaj solvoj kaj agoj

Do malliberigata Julian Assange estas malamiko de la veraj regantoj de la mondo

KAJ li ne estas la sola kiu suferas pro diri la veron.

Roger Springer



Nia virtuala kongreso

Lujn demandojn de Marcel levitajn en lastaj tagoj ni pridiskutis kadre de nia virtuala kongreso antaŭ unu semajno. La tuta kongreso estis absolute bonega ne nur pro tio ke eminentaj profesoroj enlandaj kaj eksterlandaj paroladis modelstile en Esperanto sed ankaŭ ĉar Sandor perfekte preparis ĉion elektronike kaj Jonathan registris ĉiujn programerojn por Jutubo

Ekzemple, interesitoj facile aliru la programerojn per unu klako aŭ du. Bonvolu vidi tiurilate la enkondukon de mia propra artikolo (*Apokalipso kaj post apokalipso*) kies celo interalie estas ke ne-esperantistaj bahaanoj sekvu la ekzemplon de multaj oomotanoj kiuj studas kaj disvastigas la zamenhofan lingvon

Amike, **Paŭlo Desailly**



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Esperanto-Ligo-Okcidenta Aŭstralio 2020:

KONCIZA RAPORTO FARE DE SEKRETARIO SHAYNE POWER

- * Nekrokodila Horo okazis ĉe kafejo en la Ŝtata Biblioteko ĉiumonate ĝis Kovido-19 malokazigis ĝin. Ĝi rekomencis kiel virtuala evento en Novembro '20.
- * ELOA partoprenis en "Have a Go Day" en Novembro '19 kaj '20.
- * En Januaro '20 ĉe la Ŝtata Biblioteko Shayne Power komencis instrui Esperanton al komencantoj. 8 el la 10 planitaj klasoj okazis, post kiam la biblioteko fermiĝis pro Kovido-19.
- * Zamenhof-Tagon ni celebris en Decembro 2019, kaj ankaŭ en 2020 kiam ni ankaŭ okazigis la jarkunvenon je la sama tago.
- * Rondoĵoj okazis dum plimultaj monatoj en King's Park, aŭ en la kafejo aŭ sur la greso, por eviti problemojn de Kovido-19.
- * Komitato-kunvenoj ne okazis ekde Marto, pro loko-ŝanĝoj.
- * Ni prokrastis la Jarkunvenon ĝis Decembro. **Shayne Power**

(**Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917**)



La ĉina homplatigado.

LA ĈINA ARMEO .

Estas ebla, pluraj homoj diras "neevitebla" ke iam miaj gepostvenuloj loĝos en lando okupita de la ĉina armeo. Io kio montras la diferencon inter nia nuna armeo kaj tiu de la ĉina respubliko estas jena okazaĵo.

Antaŭ pluraj jaroj okazis en Pekino ceremonia marŝado de granda parto de la armeo, kun multege da kanonoj. Ĝi okazis en la Tianminplaco. Same kiel en Aŭstralio, la plej bonaj sidlokoj estis por la registaranoj, ne por la kripluloj kiuj batalis por sia patrolando en eksterlandaj kaj enlandaj militoj. Dum la marŝado okazis demonstracio de junaj ĉinoj. Unu el ili, sciante ke laŭ la leĝo de armeoj ili ne rajtas veturigi la armeajn veturilojn sur homon, ekstaris antaŭ tia kanono. La armeaj leĝoj havas klaŭzon, ke se troviĝas sur la vojo de la veturilo obstaklo, ĝi devas halti kaj forigi la obstaklon, aŭ ĉirkaŭiri ĝin. Ekzemple se granda arbo hazarde falas antaŭ la veturilon, ĝi trovos alian vojon. Sed se la obstaklo estas forigebla, ĝi devas halti kaj forigi la obstaklon, ekzemple se infano kuras sur la vojon, aŭ se ĉevalo estas sur la vojo, aŭ se mensmalsanulo sidiĝas antaŭ la kanono, aŭ iu ajn. Kiam la demonstraciinto sukcesis ekstarti antaŭ la kanonon, la komandanto laŭleĝe devis haltigi la kanonon kaj unue forigi la obstaklon, la junan ĉinan demonstracianton. Sed kontraŭleĝe li, aŭ lia superulo, ordonis ne halti kaj transveturi la obstaklon, platigante ĝin. Kaj kial lin, kaj ne infanon? Ĝuste ĉar li estis kontraŭulo de la registaro.

La kruela epizodo estis rigardata tra la tuta mondo, ĉar televidata. Sed multaj homoj ne konsciis tiutempe, ke eĉ en Ĉinujo tia murdo laŭleĝe ne estas permesata.

Marcel Leereveld.

NIA DEMOKRATIO FORFLUGIS .

Niaj landoj nomiĝas "demokratiaj", ĉar tio signifas "regado de la popolo". La civitanoj havas elektojn por elekti la registaranojn ordonante tiujn fari kion la popolo deziras. Kaj la

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

registaranoj, elektitaj de la popolo, scias kion la popolo deziras, ĉar ili promesis fari tion. Ĉu problemoj? Ha ha ha!

Ekzistas grandaj naciaj kaj internaciaj kompanioj, kiuj ofte ne volas kion la popolo deziras ke faru la registaro. Kaj ili havas KAJ la monon KAJ la potencon devigi la registaron fari ne kion deziras la popolo sed kion deziras ili. Dum ĉiu scias la dezirojn de la popolo, la deziroj de la kompanioj restas plej ofte sekretaj, aŭ malĝuste klarigataj. Sed la kompanioj ne partoprenas en elektoj. Ne problemas, ili trovis alian manieron por influi la registaranojn: ili luas personojn kiuj estas tre kleraj en persvadi kaj devigi la registaranojn fari kion iliaj kompanioj deziras, kaj ili vizitas la registaranojn individue, ne hejme, sed en specialaj ĉambretoj en la parlamentejo. La avantaĝoj por la politikistoj? Ni ne scias, se estas iuj. Sed tiuj ĝenerale zorgas ke la kompanioj ricevas la registarajn decidojn kiujn ili volas.

Sed dum la pasinta jaro tiu sistemo de influado kaj devigado multe kolapsis, ĉar pro la korona viruso ne plu eblas konfidence viziti la politikistojn, kaj influi kaj devigi per telefono aŭ interreto ne facilas. Do nun eble estas la ŝanco ŝanĝi tiun sekretan influadon per malpermeso de sekretaj kunvenoj kun politikistoj. Ĉiuj kunvenoj kun politikistoj devos esti publikaj, ne sekretaj. La kunvenoj de politikistoj kun la popolo ja ankaŭ ne estas sekretaj. Se ni povos senigi nin de la sekreteco en politiko kaj la registaro, ni estos survoje al vera demokratio. Se nur ni agu por tio!

Marcel Leereveld.

PRI LA BELA "CI" .

Nunperiode mi uzas, mi ne scias ĝis kiam, la oficialan pronomon "ci" por la singularo de la pronomo "vi". Sed nur kun kompetentaj Esperantistoj, ne kun komencantoj kaj progresantoj, kaj nek en oficiala korespondado. Cetere mi ne havas fiksan opinion pri la preferindeco de "ci" aŭ de nur "vi". Mi uzadas "ci" precipe por ekscii, ĉu ekzistas bezono, do ĉu oni imitos min. Mi do uzas min mem kiel eksperimentaĵon. Kelkaj homoj en la mondo jam uzas ĝin. Certe estas okazoj, kie la uzo de "ci" estas pli klara en la konversacio.

Ne pensu, ke mi supozegas (= *expect*) ke ci kaj vi uzu "ci" parolante aŭ skribante al mi. Mi certe ne deziras tion, escepte se vi mem ŝatas tion, kiel kelkaj faras.

Sed estas kroma celo de mia propagando por "ci". Tio estas por forte kontraŭbatali la uzon de "ci" laŭ tiu de la eŭropaj etnaj lingvoj, nome por indiki familiarecon aŭ amon aŭ malaltrangecon, maladmiraĵon, k.t.p. Tian uzon de "ci" mi trovas tre malakceptinda. Tiujn signifojn oni povas indiki ankaŭ per aliaj vortoj, kiel faras la angla lingvo, i.a. Ni do uzu "ci" nur por la singularo de "vi", kiel en: "Vi, karaj gereĝoj!" kaj "Ci, kara reĝino!". Do dankon, Paŭlo, pro cia letero, kaj dankojn, Vera kaj Bob, pro viaj kontribuoj.

Marcel Leereveld.



Virtualaj ludvesperoj

Ĉi tiun jaron mi gastigos virtualajn ludvesperojn en Esperanto, ĉiun unuan dimanĉon de la monato, je 16:00 AEDT (UTC+11).

Ni komencos per "Codenames: Pictures" kaj "Just One". En venontaj kunvenoj ni esploros aliajn ludojn.

Aliĝu frue por certigi ke vi povas esti ludanto, ne nur spektanto! Por aliĝi kaj ricevi la

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Zoom ligilon, sendu retmesaĝon al navear@gmail.com, aŭ respondu jese al la Meetup renkontiĝo ĉi tie: <https://www.meetup.com/Melbourne-Esperanto-Meetups/events/275919165>



Joanne Johns



Universala Esperanto-Asocio



MESAĜO DE UEA OKAZE DE LA TAGO DE HOLOKAŬSTA MEMORO, 27 JANUARO 2021

Ĉiujare, la 27-an de januaro, ni markas la Tagon de Holokaŭsta Memoro, tagon de funebrado, pro la milionoj kiuj perdis la vivon, kaj de honorigo, de tiuj kuraĝaj individuoj, kiuj helpis savi la vivon de aliaj kiuj aliokaze pereus. Universala Esperanto-Asocio aparte memoras la milojn de parolantoj de Esperanto kiuj pereis kaj, inter ili, la familianoj de L.L. Zamenhof, la kreinto de Esperanto. Lia lingvo estis identigita por aparta denuncado en la libro de Hitler *Mein Kampf*.

La tagon post la alveno de la armeo de Hitler en Varsovion, la familianoj Zamenhof estis elserĉataj. La filo de L.L. Zamenhof, Adam, estis arestita kaj, komence de 1940, mortpafita; liaj filinoj Zofia kaj Lidia estis murditaj en Treblinka, kune kun lia fratino Ida, en 1942. Nur la filo de Adam, Ludwik, mirakle transvivis, dank' al ne nur sia lerteco sed ankaŭ al la ŝirmado donita al li kaj lia patrino de Pastro Marceli Godlewski, de la Paroĥo de Ĉiuj Sanktuloj, en la Placo Grzybowski en Varsovio. Pastro Godlewski, kaj aliaj personoj similaj al li, tiel helpis transvivi tiun esperon kiun oni trovas eĉ en la nomo mem de Esperanto.

La pola historiisto Zofia Banet-Fornalowa speciale funebriis kelkajn plej bone konatajn Esperanto-parolantajn viktimojn de Hitler, kaj la germana historiisto Ulrich Lins, en sia libro [La](#)

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

[Danĝera Lingvo](#), donis al ni ĝeneralan pritakson de la vasteco de la murdoj. Multaj aliaj mortis plejparte nekonataj kaj tro facile forgesataj.

La Esperanto-movado aparte funebras tiujn kredantojn pri internaciismo kaj internacia kompreniĝo kiuj, ĉu pro sia raso aŭ fizika stato, ĉu pro siaj politikaj aŭ sociaj konvinkoj pereis je la manoj de la Nazioj. Inter ili estis multnombraj esperantistoj en Germanio, Pollando, Hungario, Ĉeĥoslovakio kaj aliloke. Ili inkluzivis esperantistajn ŝtatoficistojn, instruistojn, kuracistojn, ĵurnalistojn, poetojn. Kaj inter la travivantoj estis ankaŭ esperantistaj herooj kiuj ŝirmis aliajn for de ekstermiĝo.

Universala Esperanto-Asocio honoras la memoron de la multaj esperantistoj kiuj pereis per la manoj de la Nazioj kaj rekonas la sindonon kaj kuraĝon de tiuj kiuj defiis la fortojn de teroro por savi tiujn malmultajn kiuj, minacataj de murdo, transvivis.

Informis AE **Katja Steele**

Universala Esperanto-Asocio

[Informilo 50 – januaro-februaro 2021](#)



- UEA markis cent jarojn da kunlaboro kun internaciaj organizoj en decembro 2020
- Nia Informilo atingis sian kvindekan numeron
- Rezolucio alvokas al pli da multflankismo kaj atento al lingva politiko en UN
- La Konferenco de Ne-registaraj Organizoj emfazis la bezonon de pli bonaj rilatoj kun NROj dum la pandemio
- UN-Tago 2020: “La mondo estas pli bona pro la ekzisto de UN, sed nesufiĉe pli bona.”

La Verda Stelo

La Verda Stelo estis unue proponita en artikolo en, ‘La Esperantisto’ dum 1892, por uzo kiel simbolo de reciproka rekono inter esperantistoj.

Dum jaroj, ĉiu sciis, ke esperantisto identigas sin, per la malgranda verda stelo. Nun la plej multaj Esperanto-parolantoj ne plu portas tiujn pinglojn. Kial ne? **Roger Springer**



3ZZZ

Mi petas senkulpigon de la auskultantoj, kiuj auskultis la elsendon de la 25A de januaro vive. Pro kialo, kiu ankoraŭ ne estas konata, du elsendoj aŭdeblis samtempe. La rezulto estis vera “tohavabohuo”.

Marcel kaj mi refaris la programon, el la domo de Marcel mardon, kaj ĝi nun aŭdeblas en la retejo de la Melburna Societo www.esperanto.com.au. La programo invitas al pripensoj pri la signifo de la 26a de januaro en Aŭstralio kaj pri sociaj kaj politikaj problemoj, kiuj nun similas en plelparto de la mondo pro uzado de la sama ekonomia sistemo.



Franciska Toubale

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE